


66-a jaro n-ro 196 2025:6

la **lampiro**



Tobias Rabello Leite

Pionira Vortaristo

Furora eldono de EASP



Suspensa romano
originale verkita
en Esperanto kun
dekkvino da belaj
ilustraĵoj tutpaĝaj.



Per aĉeto de ĉi tiu verko vi subtenas
la Edukan Fonduson de **Programo
Mia Amiko** ĉe EASP, ĉar 80% de la
vendoj iras rekte al ĝi.

easp.org.br/butiko

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Al fervoraj verkemuloj tutkore
- 5 | **Esplorangulo**
Manuskripto de Pionira Vortaro
- 9 | **Kino kaj aliaj artoj**
Lygia Clark
- 11 | **Por iom pripensi**
Ĉu Paca Kulturo? Kio estas tio?
- 13 | **Aktuale**
Kompara studo de COP30 kun antaŭaj COP-oj: progresoj, malsukcesoj, atendoj kontraŭ realeco.
- 15 | **Personuloj**
Vivo kaj verkoj de Jorge Amado
- 20 | **Iom da gramatiko**
Ina formo de personaj nomoj
- 22 | **El mia vidpunkto**
Motivigo kaj Metalingvistiko - La falsa promeso de 'facileco' en la lernado de Esperanto
- 25 | **Movado**
Eldonejo Lorenz: 50-jara!

Kovrilbildo generita per Artefarita
Intelektto ĉe la retejo
imagecolorizer.com



66-a jaro n-ro 196 2025:6

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2026

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Al fervoraj verkemuloj tutkore

Paulo Sergio Viana

Unu plia jaro pasas jam for! Multaj homoj asertas, ke la tempo fluas nun pli rapide ol antaŭe, sed verŝajne tian senton kaŭzas la febra, okupoplena vivo de modernaj homoj. Ankaŭ de Esperantistoj.

Jen do ni alvenis al la sesa numero de nia Lampiro en 2025. Mi esperas, ke ĝi trovas vin sanaj kaj entuziasmaj en atendado de la Nova Jaro, same febra kiel la ĵus pasinta.

En ĉi tiu numero, inter aliaj interesaj kontribuaĵoj, vi povas legi tre aktualan artikolon pri la Konferenco pri Klimato, kiu okazis en Brazilo. Grava

temo, ankaŭ por Esperantistoj. Konservi nian planedon estas ĉies devo, ĉu ne? Dankon al Patrícia Guerra pro tiu bela teksto.

Sed ne forgesu konservi por via menso ankaŭ Poezion, Filozofion, Arton, prilingvajn instruojn kaj aliajn temojn. Mi esperas, ke nia revuo kontribuas al kleriĝo kaj homeciĝo de niaj legantoj. Mi dankas tutkore al ĉiuj fervoraj verkemuloj, kiuj dum la jaro sendis siajn valorajn, pensigajn tekstojn. Ili plu faradu tion, en la proksima jaro!

Sanon al vi, kaj Feliĉan Novjaron!

easp.org.br/butiko

Negrinjo kaj aliaj noveloj

Monteiro Lobato

Tradukis:
Francisco S. Wechsler | Paulo S. Viana



Manuskripto de Pionira Vortaro

Miguel Bento

Kiel mi rakontis en la antaŭlasta numero de La Lampiro, mi kutimas vagadi tra Estante Virtual kaj aliaj tiaj retejoj, serĉe de interesaj brokantaj libroj en aŭ pri Esperanto. Verdire, plej ofte tiuj esploroj kondukas nenien: mi renkontas nur la samajn, nerarajn verkojn... Sed de tempo al tempo aperas io speciala.

Antaŭ unu jaro mi trovis eksterordinaran anoncon: "Vocabulario Esperanto-Portuguez (Caderno Manuscrito), Tobias Rabello Leite, 1908", de ŝajne obskura brokantejo el Sanpaŭlo, "Julian Livros". La prezo estis bona, do mi tuj aĉetis kaj scivole ekatendis...

La unuan misteron estis facile solvi: "Julian Livros" estas nur la interreta nomo de la tute malmistera Sebo do Messias, unu el la plej grandaj kaj famaj librobrokejoj en la tuta lando.

Ankaŭ la aŭtoro, Tobias Rabello Leite Jr., estas bone konata. Li estis fondinta membro de la unua Esper-



Tobias Rabello Leite (1852 - 1920)

anto-klubo en Brazilo, Suda Stelaro (el la urbo Campinas), kaj li aŭtoris tri gravajn, pionirajn verkojn: Pequeno Guia de Conversação Portuguez-Esperanto (Casa Genoud kaj V. Polgár-Politzer, 1909), Vortaro Esperanta-Portugala (Hachette kaj Francisco Alves, 1910) kaj Dicionario Portuguez-Esperanto (Hachette kaj Francisco Alves, 1913). Mi rimarkis ke, kvankam tiuj verkoj jam de multaj jaroj estas publika hav-

aĵo (Tobias forpasis en 1920), ili ankorau ne estis skanitaj kaj libere publikigitaj interrete – do antaŭ nelonge mi mem ŝtopis la breĉon¹.

La pionirecon de Tobias Leite varme laŭdis Ismael Gomes Braga², kiu emfazis la gravecon de tio, ke la du vortaroj estis vaste distribuataj kaj facile aĉeteblaj en ordinaraĵ librovendejoj – ja ne temis pri malgrandkvantaj propraj eldonoj, sed pri volumoj plenrajte sidantaj en la katalogo de pinta eldonejo. La konversaci-libron Tobias siatempe eldonis en pli modesta maniero, sed jardekojn poste Ismael aperigis reviziitan kaj pligrandigitan version, sub la titolo "Guia de Conversação Português – Esperanto" (FEB, 1941). Danke al la granda eldona strukturo de FEB (Brazila Spiritisma Federacio), ankaŭ tiu libro iĝis facile trovebla. Kaj en alia libro iniciatita de Ismael, "Metodo de Esperanto" (FEB, 1938), troveblas la portreto de Tobias kiun vi vidas ĉi tie.

Tamen mi revenu al la ĉefa temo: la manuskripta volumo. Ĝi bonorde liveriĝis kaj mi povis tuj konstati, ke la anonco estis plene vera: efektive temas pri pionira manskribita vortaro Esperanto-portugala, pli ol 100-jara kaj pli ol 450-paĝa! Mi ne disponas leteron aŭ iun ajn alian manskribaĵon

de Tobias, do mi ne povis kompare studi la kaligrafion, sed mi havas neniun kialon por pridubi la aŭtentecon de la volumo.

Ĝi estas ĝenerale en bona stato, malgraŭ pluraj spuroj de la tempopaso, neeviteblaj en tiel malnova libro. La kovrilo tamen jam aspektis iom tro aĉe, precipe je la spino. Ĉiuokaze, la plej grava problemo estas tio, ke ĝi estis skribita per ferogajla inko, kiu, pro sia acideco, iom post iom makulas la reverson de la paĝoj, kaj eĉ fine truas la paperon. Bonŝance, ĉio ankoraŭ estas ne tro malfacile legebla, sed verŝajne la situacio degeneros en la venontaj jardekoj.

La fakto ke tiu manuskripto plu ekzistas estas preskaŭ miraklo. Mi ne trovis menciojn pri ĝi en Esperanto-periodaĵoj, sed eble mi ion pretervidis. Ŝajne, tra la jardekoj ĝi vagis tra la bibliotekoj de silentaj kolektemuloj... nu, mi ĝojas, ke neniuj forĵetis ĝin! Mi trovis en la libro du kranajn notojn, "Adquirido em 8/7/86 – Calil" kaj "Gazeau – 14-4-62", kiuj montras, ke ĝi promenis ankaŭ en tiuj du famaj iamaj librobrokejoj de Sanpaŭlo. Alia noto, "2 vols", ŝajne indikas, ke iam alia manuskripto troviĝis kune (ĉu de la vortaro portugala-Esperanto?).

Tamen estas io stranga: sur la frontispico (la ununura tajpita paĝo) videblas la informo "2ª Edição – 1908". La ekzisto de dua eldono du jarojn antaŭ la apero de la unua ne estas tre kutima afero! Mi opinias, ke tiun enigmon solvas piednoto de la prefaco de la konversaci-libro: "Os vocabularios Portuguese- Esperanto e Esperanto-Portuguez a que acima me refiro, foram entregues, em 1907, ao 1º Congresso de Esperanto no Brazil e de sua impressão encarregou-se a Liga Esperantista Brasileira." Supozeble, do, Tobias eklaboris pri dua versio dum la unua estis (aŭ devus esti) prespretigata de Brazila Ligo Esperantista (nun Brazila Esperanto-Ligo). Tiu eldonprojekto de BEL tamen ne konkretiĝis (bedaŭrinde ne temas pri ununura okazo en la historio!).



La enhavo de la manuskripto efektive estas tre simila al la libro enmerkata de Hachette en 1910. Mi ne traktontrolis ĉion, sed analizo de kelkaj hazarde prenitaj kapvortoj montras, ke inter la du versioj ekzistas malgrandaj diferencoj, iuj kompletigoj kaj iuj forstrekoj, plej verŝajne rezultintaj el lastaj revizioj faritaj inter 1908 kaj 1910.

Por igi ĉi tiun unikan materialon alirebla al ĉiuj interesatoj, kaj por savi

la enhavon el ĝia ferogajla misfortuno, mi decidis skani ĝin. Tamen mi konstatas, ke eblus atingi sufiĉe altan kvaliton nur per uzo de ordinara skanilo. Alivorte, necesis malbindigi, skani kaj poste rebindigi la volumon. Nu, ĉiukaze la malbonstata kovrilo estis anstataŭiginda! Mi do serĉis respektindan libro-restaŭrejon en la urbo, kaj alvenis al la ateliero de Sílvia Maria Breitsameter kaj ŝia skipo. Tie mi komentis, ke la paĝoj surhavas kuriozan akvomarkon, kun desegno de velŝipo kaj la vorto "Pacific". Sílvia respondis, ke la folioj nepre estis importitaj, ĉar tiam oni tute ne produktis en Brazilo paperon de tia kvalito, kaj ke la akvomarko eĉ povus indiki ties devenon. Tiam José Artur Chies, bibliofilo kaj lernanto en la kurso de Sílvia pri libro-restaŭrado, sukcesis eĉ trovi informpaĝon pri ĝi³, en faka retejo pri paperhistorio. Mi neniam imagus, ke io tia ekzistas – por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno! La retpaĝo indikas, ke la devenlando estas Germanio, kaj la jaro 1914. Tio ne signifas, ke la indiko pri 1908 estas erara – verŝajne tiu papero produktiĝis ankaŭ pli frue.

La libro-restaŭrejo faris belan laboron, kaj la rezulton de mia skanado ĉiuj povas nun libere konsulti⁴. Trovaĵoj kiel tiu ĉi donas al mi espereton, ke eble iam ankaŭ aliaj perditaj

verkoj elfosiĝos, ekzemple la grama-
tiko kaj la vortaro de Benjamin Camo-
zato kaj Reinaldo Frederico Geyer,
kiujn Hernani Mendes anoncis en
1906⁵, sed kiuj fine neniam eliris el la
presejo, pro financaj kialoj⁶.



- 1 https://archive.org/details/pequeno_guia_portuguez_esperanto/
https://archive.org/details/vortaro_esperanta_portugala/
https://archive.org/details/diccionario_portuguez_esperanto/

- 2 Pernambuco Esperantista, aŭg/1940 (teksto represita en la libreto "Esperantismo - Artikoloj de Ismael Gomes Braga pri la Esperanto-movado" (FEB, 1942)) kaj mar/1941; Suda Stelaro, maj/1962 (teksto represita en la libro "Neforgeseblaj skribaĵoj de Ismael Gomes Braga" (BEL, 2012)); prefaco de "Guia de Conversação Português - Esperanto" (FEB, 1941).

- 3 <https://memoryofpaper.eu/feyerabend/?view=DE-SFH-2455>

- 4 https://archive.org/details/vocabulario_esperanto_portuguez

- 5 Revista Renascença, dec/1906.

- 6 Anais do XV Congresso Brasileiro de Esperanto (NITEK, 1957), p. 333.

Lygia Clark

Anna Lobo de Carvalho


Ĉi foje mi parolos pri artistino el la brazila ŝtato Minas Gerais, Lygia Clark. Mi ne konis ŝin antaŭe, sed mi tre ŝatis koni ŝin nun. Mi esperas ke vi ankaŭ ĝuu tralegi pri ŝia vivo. Lygia Pimentel Lins naskiĝis en la urbo Belo Horizonte, je la 23a de oktobro 1920 kaj forpasis en Rio-de-Janeiro, je la 25a de aprilo 1988.

En 1947 Lygia komencis sian studadon pri arto, sub orientiĝo de Roberto Burle Marx kaj Zelia Salgado. Sed en 1950, ŝi vojaĝis al Parizo, kie ŝi studis kun Arpad, Dobrinsky kaj Léger. Tie ŝi dediĉis sin al studo pri ŝtuparoj, desegnoj pri siaj filoj kaj tiel ŝi kreis la unuajn pentraĵojn per olea inko. Post sia unua ekspozicio en la Instituto Endoplastique en Parizo en 1952, ŝi decidis reveni al Rio de-Janeiro, kie ŝi faris ekspozicion en la ministerio pri Edukado kaj Kulturo. Ŝi multe studis kaj ekspociis post tio.

En 1959, Lygia partoprenis la unuan ekspozicion de Neokonketa Arto. Tiam ŝi subskribis la Neokonkretan Mani-

feston apud Amílcar de Castro, Ferreira Gullar, Franz Weissmann, Lygia Pape, Reynaldo Jardim kaj Theon Spanudis. Clark proponis per sia verko, ke pentraĵo ne plu sin vivtenos en sia tradicia maniero. Ĝi serĉas novajn flugojn.

Oni povas diri ke la poetiko de Lygia estas laŭ la vojo de ne reprezentado kaj superado de tenilo. Proponas malmistifikadon de arto kaj artisto kaj malfremidiĝon de spektanto, kiu finfine kundividas la kreaĵon de la arto.



“Antropofagia salivumo” estas eble unu el ĉiaj plej elsataraj verkoj, kie la partoprenantoj metas ŝnurtenilon en la buŝo kaj iom post iom elbuŝigas la linion kaj metas sur iun, kiu restas sube. Kiel oni povas rimarki, tio donas multe da materialo por psikanalizo kaj arto, kiuj, laŭ la artistino, promenas man-en-mane. Oni povas kompreni kvazaŭ oni formetus proprajn organojn eksteren, kaj krome oni povas kompreni la salivon kiel ion nutran kaj samtempe naŭzigan.

Mi esperas ke vi ĝuis koni iom pri ĉi tiu “freneza” artistino, kaj plu esploru pri ŝi. Ĝis la sekva fojo.!



Ĉu Paca Kulturo? Kio estas tio?

Cristina Graaf

Jus finiĝis, en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo, la 59-a Brazila Kongreso de Esperanto. La evento estis riĉiga kaj donis al ni multon por pripensi. Ĝia ĉefa temo estis “Esperanto por Paca Kulturo inter Popoloj”.

Sed, kio estas “paca kulturo”?

Ni vivas en mondo, kie armilaj konfliktoj, cyberminacoj, komercaj disputoj, kontrabandado de armiloj, drogoj kaj eĉ homoj (en la 21-a jarcento, imagu tion!), krimo, hejma perforto, maltoleremo kaj antaŭjuĝo okazas ĉiam kaj ĉie. Tio estas “kulturo de perforto”.

La homoj asertas ke ili defendas la pacon, deziras la pacon, apogas la pacon. Almenaŭ laŭ sia parolado. Kelkaj argumentas: kion mi povas fari sola? Mi ne havas influon, forton, por haltigi la militon, la krimon. Mi ne kunlaboras kun la perforto.

Ĉu vere? Ĉu vi ne kunlaboras kun la perforto kiam vi koleriĝas? Kiam vi ju-

ĝas kaj komdamnas la alian? Kiam komentas la malbonon?

Esti pacigisto signifas esti revoluciuulo. Oni devas posedi kuraĝon kaj persistemon. La paco ne estas donaco de la naturo, estas konkero, kiu dependas de kontribuo de ĉiuj anoj de la homa socio.

Nia nura kaj vera rimedo estas ene de ni mem, kaj krei pacon ene de ni



estas la nura vojo al la monda paco. Por tio, necesas kultivi empation, komprenon, toleremon, indulgon, respekton al la proksimulo.

Sendepende de tio, kio okazas ekster ni, kiam la paco regos nian menson kaj nian koron, ni trankvile vivos la pacon. Kaj niaj vortoj estos pacaj. Niaj agoj estos pacaj.

Kontraŭ la fajro, akvon. Kontraŭ agresemo, ĝentilecon. Kontraŭ antaŭjuĝo, toleremon. Kontraŭ krimo, honestecon. Kontraŭ la ribelo, komprenon.

Ni malhelpos la perforton per niaj pacaj reagoj. Ni disvastigos la pacon ĉirkaŭe, ni infektos la aliajn per la paco. Tiel, ni ŝanĝos la kulturon de perforto al la kulturo de paco. Tia paco interna, forta, sekura, trankvila. Tia, kia komprenas, toleras, pardonas kaj daŭrigas. Tia, kiu estas en la lumo, en la naturo, en Dio.



Kompara studo de COP30 kun antaŭaj COP-oj: progresoj, malsukcesoj, atendoj kontraŭ realeco.

Patrícia Guerra

Ĉi tiu artikolo komparas COP30 (Belém, 2025) kun antaŭaj konferencoj de UNFCCC, precipe COP21, COP26, COP27 kaj COP28. Ĝi celas kompreni progresojn kaj malprogresojn en la internacia klimata reĝimo, same kiel la breĉon inter sciencaj, sociaj kaj politikaj atendoj kaj la efektive atingitaj rezultoj. Ĝi konkludas, ke COP30 plifirmigis progresojn en la financado kaj adaptiĝo-akso, sed prezentis signifajn limigojn rilate al la progresema elimino de fosiliaj brulaĵoj kaj la difino de klara vojo por justaj transiroj.

La Konferenco de la Partioj (KP) reprezentis, ekde sia kreo en 1995, fundamentan spacon por tutmonda klimata intertraktado. COP30, okazinta en 2025 en la brazila Amazonio, elstaras ne nur pro sia simbola loko, sed ankaŭ pro la atendoj de progreso en pli fortikaj klimataj engaĝiĝoj kontraste al antaŭaj kunvenoj¹.

Historie, konferencoj kiel COP21, okazinta en Parizo, plifirmigis signifajn mejloŝtonojn, kiel ekzemple la Pariza Interkonsento². Tamen, postaj COP-oj, kiel COP25 en Madrido kaj COP28 en Dubajo, rivelis praktikajn limigojn rilate al la efektivigo de la faritaj engaĝiĝoj³. Komparo inter ĉi tiuj eventoj montras ŝablonon de formalaj progresoj, kiuj ofte ne tradukiĝas en efikajn agojn.

COP30 tial aperas en kunteksto de kreskanta klimata urĝeco. Ĝiaj atendoj inkluzivas la firmigon de pli ambiciaj mildigaj celoj, la plifortigon de klimata financado, kaj la efektivigon de adaptiĝaj mekanismoj celantaj precipe la plej vundeblajn landojn⁴. Tamen, la realo de internaciaj intertraktadoj montras, ke ekonomiaj interesoj kaj geopolitikaj disputoj povas konsiderinde limigi ĉi tiujn progresojn.

(Daŭrigota sekvapaĝe)

Kompare, dum antaŭaj Konferencaj Komisionoj (COP) faris progreson en retoriko kaj politika formulado, konkreta efektivigo restas nesufiĉa⁵. Tiel, COP30 reprezentas kaj ŝancon kaj decidan defion por redifini la tutmondan klimatan trajektorion.

Notoj

- 1 Vidu: Viola, E.; Franchini, M. *Tutmonda Klimata Politiko*. Campus, 2020.
- 2 Pri la Pariza Interkonsento, vidu: Bodansky, D. *La Arto kaj Metio de Internacia Media Juro*. Harvard University Press, 2019.
- 3 Kritikaj analizoj de COP25 kaj COP28 troveblas en: Falkner, R. *Grandaj Potencoj, Klimata Ŝanĝo kaj Tutmondaj Mediaj Respondecoj*. Oxford University Press, 2022.
- 4 Preparaj informoj pri atendoj por COP30 haveblas en: SEEG Brasil. *Emisiaj Raportoj*, 2024.
- 5 Diskutoj pri longdaŭra klimata efektivigo: Keohane, R.; Oppenheimer, M. "Parizo: Preter la Klimata Sakstrato?" *Politiko kaj Administrado*, 2016.

Referencoj

- BODANSKY, Daniel. *The Art and Craft of International Environmental Law*. Harvard University Press, 2019.
- FALKNER, Robert. *Great Powers, Climate Change and Global Environmental Responsibilities*. Oxford University Press, 2022.
- KEOHANE, Robert.; OPPENHEIMER, Michael. Paris: Beyond the Climate Dead End? *Politics and Governance*, 2016.
- SEEG Brasil. *Relatórios de Emissões*. 2024.
- VIOLA, Eduardo.; FRANCHINI, Matías. *Política Climática Global*. Campus, 2020.

Kinkas Borba

Machado de Assis

Tradukis:
Francisco S. Wechsler




easp.org.br/butiko

Vivo kaj verkoj de Jorge Amado

Milton Paulo

JORGE LEAL AMADO DE FARIA (1912 – 2001) estis unu el la plej famaj kaj tradukitaj brazilaj verkistoj de ĉiuj tempoj, estante la plej adaptita aŭtoro por filmoj, teatro kaj televido. Lia literatura verkaro – 49 libroj entute – estis tradukitaj en 80 landoj, en 49 lingvojn, same kiel en brajlon kaj sur registritaj kasedoj por vidhandikapitoj. Pri lia stilo, la fikcia romano, ne ekzistas io simila en Brazilo. En 1994, lia verkaro estis agnoskita per la Premio Camões, la plej prestiĝa premio en portugallingva literaturo.



INFANAĜO. Naskita en bieno en Ferradas, iama distrikto de la nove emancipita Itabuna, Jorge Amado baldaŭ migris por vivi en la urbo Ilhéus pro severa inundo de la rivero Cachoeira kaj pro la epidemio de variolo kaj hispana gripo, kiuj okazis en tiu parto de la regiono Grapiuna, sed li estis registrita en la registrejo de la vilaĝo Ferradas kiel la plej aĝa filo de Kolonelo João Amado de Faria kaj lia edzino Eulália Leal. Li havis tri aliajn fratojn: Jofre, Joelson kaj James, la sola naskita en Ilhéus. Precize en la sidejo de la iama kapitaneco de São Jorge dos Ilhéus, Jorge pasigis parton

de sia infanaĝo, tial multaj atribuas lian naskiĝlokon al tiu urbo, kiu funkciis kiel scenejo por liaj romanoj kaj noveloj pri la temo kakao.

JUNULECO Bakalaŭro pri Juro, 1935, sed neniam praktikis juron. Kiel adoleskanto, 14-jaraĝa, li komencis aktive partopreni en la literatura vivo en Salvador. Li estis unu el la fondintoj de la "Akademio de Ribeluloj", grupo de junuloj, kiuj ludis gravan rolon en la renovigo de la Bahia literaturo. Iliaj verkoj estis publikigitaj en revuoj fonditaj de ili mem. La subskribo de Jorge Amado ĉe la promulgo de la Konstitu-

cio de la Respubliko de La Unuigitaj Ŝtatoj de Brazilo de 1946, la unua de supre ĝis sube. Li iris al Rio-de-Ĵaneiro, tiam la ĉefurbo de Brazilo, por studi ĉe la Jura Fakultato de la Universitato de Rio-de-Ĵaneiro, nun la Nacia Jura Fakultato de la Federacia Universitato de Rio-de-Ĵaneiro (UFRJ). Dum la 1930-aj jaroj, la fakultato estis centro por politikaj kaj artaj diskutoj, kie li havis siajn unuajn kontaktojn kun la organizita komunista movado.

Li fariĝis ĵurnalisto kaj implikiĝis en komunisman ideologian politikon, kiel multaj el lia generacio. Jorge Amado estis Federacia Deputito por San-Paŭlo, en la Periodo 5-a de februaro 1946 ĝis 10-a de januaro 1948. En 1946 li estis elektita Federacia Deputito por la Brazila Komunista Partio (PCB) en San-Paŭlo, kio alportis al li fortan politikan premon. Kiel deputito, li verkis la amendon kiu garantiis religian liberecon, post atestado de la suferado de tiuj, kiuj sekvis afrikajn sektojn, same kiel protestantoj en Ceará, rabbitaj de fanatikuloj kun kruco antaŭe - li serĉis subskribojn ĝis li sukcesis aprobi sian amendon, kaj de tiam religia libereco fariĝis leĝo.

Lia verkaro estas unu el la plej signifaj en moderna brazila fikcio, esence fokusita sur naciaj radikoj. Konstantaj

temoj en lia verko inkluzivas sociajn problemojn kaj maljustecojn, folkloron, politikon, kredojn, tradiciojn kaj la sensualecon de la brazila popolo, tiel kontribuante al la disvastigo de ĉi tiu aspekto. Li estis kuzo de la advokato, verkisto, ĵurnalisto kaj diplomato Gilberto Amado, de Gilson Amado, fondinto de Eduka TV, kaj de la aktorino Véra Clouzot.

Li estis edziĝinta al la verkistino **Zélia Gattai**, kiu sukcedis lin en 2002 en la seĝo 23 de la Brazila Akademio de Beletristiko. Kun ŝi, li havis du infanojn: João Jorge (naskita la 25-an de novembro 1947) kaj Paloma Jorge (naskita la 19-an de aŭgusto 1951). Li ankaŭ havis alian filinon, Eulália Dalila Amado (naskita en 1935, kiu mortis trofrue kiam ŝi estis nur 14-jaraĝa, en 1949), el antaŭa geedzeco kun Matilde Garcia Rosa.

LA PASPORTO DE JORGE AMADO

Li vivis ekzile en Argentino kaj Urugvajo (1941 ĝis 1942), en Parizo (1948 ĝis 1950) kaj en Prago (1951 ĝis 1952). Kiel profesia verkisto, li vivis preskaŭ ekskluzive de la tantiemoj de siaj libroj. Dum sia ekzilo en Sovetunio, li estis monitorata kaj de la CIA, kaj de la sovetiaj sekurecaj servoj. Li forlasis la PKB en 1956, post la denuncioj de Nikita Ĥruŝĉov kontraŭ Josif Stalin ĉe

la 20-a Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio. En 1958 li publikigis *Gabriela Kariofilo kaj Cinamo*, kiu reprezentis turnopunkton en la literatura produktado de la aŭtoro, kiu ĝis tiam traktis sociajn temojn. En ĉi tiu dua fazo li kreas kronikon de kutimoj, markita de popularaj tipoj, potencaj koloneloj kaj sensualaj virinoj. Krom *Gabriela Kariofilo kaj Cinamo*, la romanoj *SinJORINO Floro kaj ŝIAJ du edzoj* kaj *Tereza Batista laca de milito* estas reprezentaj de ĉi tiu fazo. Malgraŭ la "turnopunkto" en la verko, ĝi daŭre estis publikigita en Sovetunio.

Unue publikigita en 1966, la verko *SinJORINO Floro kaj ŜIAJ Du Edzoj* estas konsiderata kroniko pri la kutimoj de la vivo en Bahio. Gvidata de la inspiro de magia realismo, la rakonto prezentas SinJORINON Flor kiel virinon, kiu sukcesas plenumi la fantazion kunpreni sian mortintan edzon kaj sian nunan edzon al la lito samtempe. La unua, fripono; la dua, ĝuste lia malo - nur tiel SinJORINO Flor sentas sin vere kompleta kaj feliĉa. La libro estas punktitita per kuirartaj receptoj, Kandombleaj ritoj, kaj ekzemploj de kontraŭdiro, kiu tiel bone portretas Brazilon: la kunekzisto de la serioza kun la ne-respondeca, plezuro kaj devo, la regulo kaj la "jeitinho" (brazila maniero eviti regulojn). Redakcia sukceso,

SinJORINO Flor fariĝis unu el la plej popularaj roluloj en la nacia literaturo. En la 1990-aj jaroj, tamen, li spertis fortan streĉon kaj la atendon de grava bato al siaj personaj financoj, kun la bankroto de Banco Econômico, kie li havis siajn ŝparaĵojn. Tamen, li ne perdis siajn ŝparaĵojn, ĉar la banko fine estis intervenita de la Registaro.

Estinte en malbona sano dum kelkaj jaroj, li mortis la 6-an de aŭgusto 2001, pro kormalsano. En junio de la sama jaro, li jam estis hospitaligita pro diabeta krizo. La korpo de Jorge Amado estis kremaciita, kaj liaj cindroj enterigitaj ĉe lia hejmo en la kvartalo "Rio Vermelho de Salvador". La cindroj de Zélia ankaŭ estas deponitaj en la sama loko, kie ŝi mortis en 2008. Hodiaŭ, la Domo do Rio Vermelho funkcias sur la loko, ekspoziciante memoraĵojn pri la vivo de la paro kiel verkistoj.

Unu el iliaj verkoj estas *O Gato Malhado e a Andorinha Sinhá*, kiu estis verkita por ilia filo João Jorge kiam li fariĝis unu-jaraĝa. La teksto perdiĝis kaj nur en 1978 ĝi estis publikigita por la unua fojo, post kiam ĝi estis retrovita de ilia filo kaj prenita al Carybé por ilustraĵo. Li estis amiko kaj granda admiranto de Antônio Carlos Magalhães, unu el la plej emblemaj politik-

istoj de Bahio, kun kiu li havis aman rilaton.

TRADUKOJ DE VERKOJ

La verkaro de Jorge Amado estis publikigita en 55 landoj kaj tradukita en 50 lingvojn, inkluzive en Esperanton.

La verkisto ricevis plurajn naciajn kaj internaciajn premiojn. Li ankaŭ ricevis la gradojn de Komandanto kaj Granda Oficiro en la ordenoj de Argentino, Ĉilio, Hispanio, Francio, Portugalio kaj Venezuelo, Granda Oficiro de la Militista Ordeno de Sankta Jakobo de la Glavo de Portugalio la 8-an de marto 1980 kaj Granda Oficiro de la Ordeno de Princo Henriko la Navigisto la 14-an de julio 1986, krom tio, ke li ricevis honoran doktorecon de pli ol dek universitatoj en Brazilo, Italio, Israelo, Francio kaj Portugalio. La doktorecon de la franca Sorbonne estis la lasta, kiun li ricevis persone dum sia fina vojaĝo al Parizo en 1998, kiam li jam estis malsana. Li estis koresponda membro de la Akademio de Sciencoj kaj Literaturo de la Germana Demokratia Respubliko; de la Lisbona Akademio de Sciencoj; de la Paulista Akademio de Literaturo; kaj speciala membro de la Bahia Akademio de Literaturo.

LETEROJ

Ekzistas pli ol 100 000 paĝoj da leteroj interŝanĝitaj kun homoj el la tuta mondo, nuntempe katalogata kaj konservata en izolita kolekto ekde ĝia fondo. La donaco estis farita kun skribakondiĉo: "Jorge skribis, ke ĉi tiu materialo estu malfermita al la publiko nur kvindek jarojn post lia morto," laŭ la poetino Myriam Fraga, kiu direktis la institucion ekde ĝia kreo antaŭ dudek jaroj.

De raportoj pri libroj kaj artaĵoj ĝis ĉiutagaj eventoj, li korespondis kun grandaj verkistoj, poetoj kaj intelektuloj de sia tempo: Graciliano Ramos, Érico Veríssimo, Mário de Andrade, Carlos Drummond de Andrade, Monteiro Lobato kaj Gilberto Freyre, inter multaj aliaj brazilanoj; Pablo Neruda, Gabriel García Márquez kaj José Saramago, inter multaj aliaj fremduloj.

En la politika kampo, korespondado estis establita kun vasta gamo da figuroj kiel: Juscelino Kubitschek, François Mitterrand kaj Antônio Carlos Magalhães.

JORGE AMADO KAJ LA NOBEL-PREMIITO PRI LITERATURO, JOSÉ SARAMAGO, EN BAHIO

Specife koncerne lian amikecon kun José Saramago, ĝi estis amikeco

de maljunaĝo. La bahjano, 80-jaraĝa, kaj la portugalo 10 jarojn pli juna. Dum kvin jaroj, inter 1992 kaj 1997, la du verkistoj interŝanĝis leterojn kaj faksojn por diskuti siajn literaturajn kaj sanajn krizojn, tipajn por aĝo kaj profesio. Paloma, la filino de la brazilano, kaj Ricardo Viel, de la Fondaĵo José Saramago, organizis tiun epistolan rilaton kaj elektis la leterojn inkluditajn en la libro Jorge Amado/José Saramago – Kun la Maro Inter Ni. La leteroj montras kiel la verkisto ricevis la plej neatenditajn petojn kaj ankaŭ prezentis homojn unu al la alia en tempo kiam poŝta dialogo estis intensa. La persona korespondado de Jorge Amado povas oferti valoregan fonton de esplorado. Kelkaj eltiraĵoj prenitaj el ekskluziva raporto de Josélia Aguiar por Revista *Entre Livros* - Jaro 2, n-ro 16:

De Glauber Rocha, sendata, pri la nova filmo (La Aĝo de la Tero, 1980). "Mi komencis la tagon plorante pro la morto de Clarice (Lispector)," komenciĝas la letero, daŭrigante pri la nova filmo: "Ĝi estas farata kvazaŭ oni skribas romanon. Ĉiutage mi filmas du ĝis sep scenojn, kun rekta sono, improvizitajn el certaj temoj. (...) Mi fine havas la senton 'skribi per la fotilo kaj per la sono', provante vojon kiu kunfandis la menson de Jece (Valadão, aktoro) (...)."

Mário de Andrade, baldaŭ post legado de *Mar Morto* en 1936, laŭdas tion, kion li nomas "honesta realeco" kaj la "belan tradicion meti lirikon de poezio en prozon": "La juna Jorge Amado, granda promeso de la intelekta mondo, ĵus ricevis sian doktorecon pri la romano."

Monteiro Lobato, ankaŭ profunde impresita post legado de **Morta Maro**, 1936: "Mi legis ĝin kun la sama tragika emocio, kiun liaj libroj ĉiam vekas en mi," kaj rakontas, ke, vizitante la havenon de Salvador, li "antaŭvidis", ke la verko estos verkita: "Iam el ĉi tiuj tagoj Jorge Amado atentos kaj pentros la dramojn, kiuj devas ekzisti ĉi tie. Mi divenis ĝin."

Pablo Neruda (en mallonga letero, datita la 16-an de oktobro kaj jaro necerta, manskribita): "Ĉu mi povus fari unu aŭ du pagitajn recitalojn en Brazilo?" (...) "Ĉu ekzistas iu komercisto interesata pri serioza organizado de ĉi tiu turneo?" (...).

Inter aliaj, kiuj estis parto de la amikaro de Jorge Amado, indas mencii: Federico Fellini, Alberto Moravia, Yves Montand, Jorge Semprún, Pablo Picasso, Oscar Niemeyer, Vinícius de Moraes, Jean-Paul Sartre kaj Simone de Beauvoir.

Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



Demando

Tiu ĉi demando koncernas la inan formon de personaj nomoj en Esperanto. Kelkaj uzas la finaĵon -a por tio: *Franciska, Alberta, Johana, Paŭla, Ludovika*. Ĉu rekomendinde? Aliaj uzas la finaĵon -ino. En kurso de Esperanto eldonita de SAT kaj tre populara en Brazilo en la pasinta jarcento, oni trovas la formon *Johanino*. Ĉu oni rajtas uzi ankaŭ la nomojn *Franciskino, Albertino, Paŭlino, Ludovikino*?

Respondo

Koncize: uzi la finaĵon -a por formi virinajn nomojn surbaze de viraj tute ne estas rekomendinde. Oni formu ilin per la sufikso -in plus la finaĵo -o, kiel ekzemple en *Johanino, Franciskino* ktp. Se la nomo estas denaske virina, oni simple uzu la finaĵon -o, kiel ekzemple en *Elviro* aŭ *Moniko*.

Malpli koncize: la uzon de la finaĵo -a por formi virinajn nomojn apogas *Plena Analiza Gramatiko* (1984):

“Post viraj nomoj per **ino** oni signas la respektivan *virinan nomon*. Ekzem-

ple: *Paŭlino, Juliino*. Por ricevi formojn pli internaciajn, oni povas formi adjektive la virnomojn kaj subkomprenante forlasi la sufikson (Paŭla ino: *Paula*). Per analogio oni povas tion fari eĉ tiam, kiam la virina nomo ne havas viran ekvivalenton (Eva, Brigita). Ekzemploj: Ada, Agata, Angelika, Anna, Antonia, Aŭgusta, Baba, Barbara, Berta, Bernarda, Cecilia, Debora, Diana, Dorotea, Dora, Eleonora, Eliza, Elizabet, Elvira, Emma, Emilia, Eugenia, Eva, Flora, Greta, Franciska, Gabriela, Genoveva, Georga, Gertruda, Henrieta,

Ida, Irena, Izabela, Iza, Izidora, Johana, Jozefa, Julia, Kamila, Katerina, Klara, Klotilda, Kristina, Laŭra, Lidia, Livia, Lucia, Luiza, Ludovika, Margareta, Maria, Mariana, Marta, Matilda, Monika, Natalia, Ofelia, Olimpia, Paula, Pia, Priska, Rebeka, Regina, Renata, Roza, Rozalia, Roksana, Sibila, Santa, Sara, Serafina, Serena, Severa, Silvia, Simona, Sofia, Stefana, Suzana, Tekla, Teodora, Tereza, Terezia, Valeria, Veronika, Vera, Viktoria, Vilhelma, Viola, Virginia, Zaira, Zenobia, Zita ktp.

La sola malavantaĝo estus, ke oni ne povas uzi proprajn nomojn en posed-adjektiva formo. Sed la oportuneco de la supraj formoj estas pli grava gajno, ol kia perdo estas la evito de tiuj formoj, malofte uzataj. Cetere, nenio malhelpas diri *Elizabeta epoko*; tiam oni rezignas pri la markado de virineco, sufiĉe evidenta per si mem; ankaŭ *Johana mano* estas nemiskomprenebla, se antaŭe temis pri Johano. Krome estas ĉiam ebla rimedo, uzi sufiksoidon: *Elizabetana epoko*, *Johanna mano*.” (PAG §339, Rim. I, 1984)

Tamen la ĉi-supran proponon prave kritikis K. Leroux en sia antaŭparolo al la nova eldono de *Plena Ilustrita Vortaro* (2005): “Sed, male al la antaŭa

iniciato de Waringhien, mi ne povas akcepti, ke la lasta fonemo a de kelkaj el tiuj nomoj estas esperantlingva morfemo. Mi ankaŭ rifuzas, malgraŭ la aŭtoritato de Kalocsay kaj Waringhien, ‘esperantigi’ sistemece virinajn nomojn per la uzo de la morfemo a, kiu en nia lingvo povas signi nur adjektivojn. [...] La seksajn diferencojn oni serĉu en la radikoj (de la sociaj antaŭjuĝoj!), ne en la gramatikaj finaĵoj.”

Mi plene akordas kun la sinteno de Leroux, kaj aldonas, ke la uzo de **-a** por formi virinajn nomojn, kiuj estas sendube substantivoj, kontraŭas la 2-an regulon de la Fundamenta Gramatiko. Ekzemple, en la franclingva versio de tiu regulo troviĝas la jeno: *Le substantif finit toujours par o* (la substantivo finiĝas ĉiam per o). Por liberigi sin el tiu limo, la aŭtoroj de PAG provas pravigi la uzon de a per supozata subkompreno de adjektivo; sed, plenespekte al ilia memoro, mi opinias tiun aserton senbaza kaj Prokrusta.

Fine, por nomoj alilingvaj, tamen skribitaj per la esperantlingva alfabeto, oni rajtas uzi *iun ajn finaĵon*, inkluzive por virinaj nomoj. Do ekzemple: Adam, Eva, Marta, Hedvigés, Miĉiko, Ĵamal, Aĥmed, ktp.



Motivigo kaj Metalingvistiko

La falsa promeso de ‘facileco’ en la lernado de Esperanto

Paulo P. Nascentes¹

Verŝajne urĝas pli profunda kritika analizo pri la interna kaj ekstera motivo rilate al la lernado de fremdaj lingvoj, kun specifa fokuso en la komunumo kaj pedagogio de Esperanto. Indas pristudi kelkajn faktorojn kaj respektivajn efikojn. Tio, se sufiĉe konata kaj forlasata de niaj foje nekonsciaj pedagogiaj metodoj kaj praktikoj, antaŭenpuŝos la efikecon de niaj kutimaj agoj cele al la instruado-lernado de Esperanto, kie ajn ĝi okazu. Alia epoko certe ekaperos en nova scenejo. Eĉ en neprofesia kunteksto, la zorgema prikonsidero de kelkaj lingvaj, psikologiaj kaj sciencaj principoj povos reprezenti iagradan novigon en nia ĝisnuna plurjara situacio.

1. La Facileco de Esperanto: ĉu Relativa ĉu Absoluta

- **Absoluta Facileco:** Rekono de trajtoj, kiuj igas Esperanton pli alirebla kompare kun etnaj lingvoj,

ekzemple, regulaj morfologio kaj fonetiko, malpli da esceptoj, kongruo al la parolanta intuicio. Decida estas tiu lasta faktoro, ĉar ĉiu studento venigas mense lingvajn hipotezojn, kiuj pro la menciita reguleco konfirmiĝas. Konataj ekzemploj estas la gramatikaj finaĵoj -a, -e, -i, -o, respektive por adjektivoj, adverboj, verboj kaj substantivoj. Same la fakto ke, ĝenerale, al ĉiu sono respondas unu litero. Temas pri lingvaj principoj.

- **Relativa Facileco (Percepto de la Lernanto):** Diskuto pri tio, kiel la facileco estas perceptata rilate al la etna lingvo de lernanto. Certe parolantoj de latindevena lingvo aŭ mandareno povas havi malsamajn lernado-kurbojn. La koncepto de "facileco" do estas subjektiva kaj kultur-perata. Kiom da eternaj komencantoj vi mem konas, kara leganto? Balbutuloj ĉu ne

abundas en Esperantujo, revantaj pri fluganta flueco?

◦ **Facileco kiel Argumento:**

Konstateblas, ke la komenca facileco rapide vanuas. Tiel la defio atingi la realan fluecon (nivelo B2/C1) estas komparebla al tiu de iu ajn lingvo. Tio postulas sindediĉon kaj mergadon. Antaŭ relativa komenca progreso, indas krei instigajn situaciojn favorajn al pli altaj niveloj en konversacio, legado, aŭdado de sondosieroj, intervjuoj, spektado de videoj kaj filmoj. Ĉe ni indas starigi specon da pedagogio de la flueco, ĉu?

1. Decida Faktoro: Trans la "Facileco de Lernado" kiel Motiviga Motoro

◦ **Ekstera Motivigo (la 'Promeso'):**

La facileco estas ekstera motoro de motivigo (rapida komenco, sensacio de progreso), sed tiu motivigo estas disfluga kaj dependa de tujaj rezultoj en la komunik-kapablo. Ĉu ekzistas seriozaj esploroj pri kaŭzoj de la konata forigo de lernantoj el E-kursoj en kluboj, asocioj, lernejoj? Ĉu indas pli bone koni tiun fenomenon?

◦ **Interna Motivigo (la 'Celo'):** La fokuso devas pli-kaj-pli transiri al la interna motivigo:

◦ **Praktika Utilo:** La kapablo sin konekti al aktiva tutgloba komunumo, vojaĝi, partopreni kulturajn aranĝojn. Aŭdace instrui la Internacian Lingvon, legi kaj prelegi, artikoli por magazenoj, revuoj, ĵurnaloj antaŭeniras la lernadon, ĉar onin devigas al ofta konsultado al vortaroj.

◦ **Ideologiaj Valoroj:** La idealo de neŭtrala kaj egaleca lingvo (filozofia, socia motivigo) estas altranga motivigilo. En Brazilo kurioza trajto estas ia speco da sankta kulto al personeco, speco da idolatrio al la figuro de la Inicinto de Esperanto, kvazaŭ li estus sanktulo kaj la lingvo, religio.

◦ **Metalingvaj Gajnoj:** La propedeŭtika efiko de Esperanto (Plibonigo de la gramatika kompreno kaj preparo por aliaj fremdaj lingvoj). Pri tio delonge estas konataj la pioniraj sciencaj esploroj de la Universitato de Paderborn. Diversaj aliaj daŭre aperas. Tio devas esti prezentata kiel pli fortika motivigo. La moderna mondo postulas de ĉiu civitano la lernadon minimume de la angla, hispana, franca... Ideale, se solvita la interpopola lingva bariero per tiu neŭtrala komunikilo, ĉiu

studento libere elektos kiujn lingvojn lerni.

1. Pedagogiaj kaj Komunumaj Implikoj (Perspektivoj)

- **Lingvistikaj Argumentoj:** Kiom la pedagogio de Esperanto devas evolui por emfazi ne nur la bazan strukturon, sed ankaŭ la stilistikan uzon, progresigan vortaron, kulturan esprim-plenecon? Necesas instigi kaj subteno al la propono de profesinivela instruilaro, kiu pritraktu la "kompleksecon de la flueco".
- **Psikologiaj Argumentoj:** Diskuto pri la kapablo sin superi. Kiel prepari studentojn por la neevitebla frustrado dum la transiro de la komenca fazo (facileco) al la fazo de regado (defio). Ĉu indas serioze esplori pri la ĉefaj kaŭzoj de la lerneja forlaso, monatojn post la komenco de la studado?
- **Sociaj kaj Kulturaj Argumentoj:** Esperanto ne estas nur facila gramatiko; ĝi estas kulturo, literaturo kaj komunumo. La elportebla motivigo staras en la aktiva partopreno en tiu kulturo. Oportuna provoko: Se Esperanto estus pli malfacila, ĉu la komunumo estus pli malgranda, sed la membroj estus pli motivigataj?

Propona Konkludo:

Ĉu la esperanta movado bezonas adopti argumentadon pli honestan kaj nuancoplenan? Anstataŭ vendi la "facilecon", ĉu ne devas promocii la **valoron** de Esperanto: ĝian rolon en lingva edukado, komunuman potencialon kaj la kulturan riĉigon ofertatan? La sukceso en la lernado kuŝas sur la **deziro** kaj **celo** (interna motivo), kaj ne sur la propra (kaj limigita) struktura simpleco de la lingvo.

Necesas pli funda kritika analizo de la dikotomeco inter ekstera kaj interna motivoj. Necesas esplori la kompleksan krucponton kaj influon en la proceso de akiro kaj kapabligo de fremdaj lingvoj. Tiu artikolo komencanivele specife tuŝis la komunumon, pedagogian metodologion, filozofiajn principojn de Esperanto, kun supraĵa ekzameno de faktoroj, kiaj la komunuma identeco (interna) kaj la tutgloba praktika utileco (ekstera), kiel ili manifestiĝas kaj interagas por antaŭenpuŝi la sindediĉon de lernantoj de tiu planlingvo.

Sincere deziras la Aŭtoro, ke pluraj aliaj artikoloj pri tiu instiga temo venu lumen.

1 Emerita profesoro de Esperanto kaj la portugala, preleganto, poeto, artoterapiisto, aŭtoro de la dulingva beletra blogo Papos Nascentes


Eldonejo Lorenz: 50-jara!

Paulo S. Viana

Je la 13-a de decembro 2025 oni festis en Rio-de-Janeiro eksterordinaran okazon: Eldonejo Lorenz kompletigis 50 jarojn da senĉesa, fekunda agado. Dekoj da Esperantistoj kaj simpatiantoj kunsidis en la historia sidejo de Brazila Spiritisma Federacio por rememori kaj konfirmi sian apogon al ĉi tiu unika organizo en la mondo. Lorenz havas kiel celon la diskonigadon de Esperanto al spiritistoj kaj de Spiritismo al Esperantistoj, en la tuta mondo. Por tio, ĝi eldonas librojn en la portugala lingvo kaj en Esperanto. Ĝi senpage disdonas verkojn en Esperanto al Esperantistoj en la tuta mondo, aktive partoprenas en universalaj kongresoj de Esperanto, ĉiujare eldonas Almanakon Lorenz kaj la virtualan bultenon “Komunikoj”. Nuntempe, post dekoj da zorgoplena administrado, ĝi konstruas sian propran sidejon en Rio. Ĝin fondis en la jaro 1975 grupo da idealistoj, inter kiuj elstaris Délio Pereira de Souza, kaj ĝin subtenas

volontula laborado kaj donacoj de la Esperantista komunumo.

La Esperanta movado estas tute neŭtrala rilate religion, politikon kaj aliajn vidpunktojn pri la socio. Ĉiuj estas bonvenaj. Aliaj religiaj movadoj, kiel “Oomoto”, en Japanujo, la persdevena Bahai, krom la katolika kaj la protestanta movadoj, uzas Esperanton por diskonigado de siaj ideoj. Kaj ĉiuj frate kunvivas.



Quer aprender **ESPERANTO?**

PROGRAMO MIA AMIKO



eas**p**

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

pma.brazilo.org